

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

“Muzeo” inaŭgurita!

Esperanto-Muzeo Jokohama estis oficiale inaŭgurita en la 23a de aprilo 2021, kiel indikas la suba saluto. En la 25a, sen aparta ceremonio en la pandemia tempo, ni havis Malfermon al esperantistoj. Venis al ni 6 esperantistoj el ekster nia rondo, loĝantaj en nia Gubernio Kanagawa kaj la najbara Tokio. La foto estis farita posttagmeze, sed nature ne ĉiuj vizitantoj aperas tie.

Oni rigardis la ekspoziciitajn “lernolibrojn el la tuta mondo” en la unua etaĝo, kaj libraro en bretoj kaj ŝrankoj en la dua etaĝo.

Ni esperas malfermi “Muzeon” al najbaraj lernejoj instruistoj en julio, kaj ĝenerale al la civitanoj en novembro, sed la KOVIMa situacio fine decidis la aferon.



Bonvenon al Esperanto-Muzeo Jokohama

Esperanto estas lingvo, per kiu homoj en la tuta mondo interamikiĝas trans naciaj limoj, trans lingvaj baroj. Ni en Jokohamo praktikas Esperanton, bonvenigante tutmondajn homojn ĉi-tien aŭ mem bonvenigante en aliaj mondopartoj. Ĉi tiu muzeo servos montri tiajn agadojn al la vizitantoj.

En Esperanto, de la fino de la 19a jarcento, multaj literaturaĵoj estis tradukitaj aŭ originale verkitaj. Jam amasiĝas tiulingvaj novaĵoj, eseoj, fakaj literaturaĵoj. Ĉi tiu muzeo ankaŭ servos por ke vi mem certigu tiajn fruktojn.

Ni ricevis de japanaj kaj mondaj esperantistoj donace valorajn objektojn por ekspozicii.

Ni multe dankas ilin.

Okaze de la 6a fondotago de la NPO,

la 23an de aprilo 2021

Sibayama Zyun'iti,

la Prezidanto de la Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama

Virtuala sistemo Zoom kaj Aŭstralia kaj Nov-zelanda Kongreso

Murata Kazuyo

Ekde la lasta somero mi komencis uzi la sistemon *Zoom*. Ĉiusemajne nia lernklaso “Jokohama Salono” funkcias per *Zoom*. Restante hejme ni povas lerni kaj ĝui eĉ koncerteton danke al ges-roj IWAYA, kiuj ludas klavaran muzikilon kaj mandolinon. Okaze de la Kantoa Kongreso kaj Japana Esperanto-Kongreso en Nagoja mi povis partopreni parton de la programeroj.

La plej bona programo por mi estis ANEK (Aŭstralia-Nov-zelanda Esperanto-Kongreso kaj Somera Kursaro) organizita de Sidneja Esperanta Grupo okazinta inter 9a-13a de januaro 2021.

ANEK

Mi partoprenis en ĝi preskaŭ ĉiujn programerojn. Tiu kongreso estis mirinde bone aranĝita.

Antaŭ tagmeze de la 9a ĝis 11a okazis 3 kursoj, por komencantoj, progresantoj kaj spertuloj. Mi elektis la duan, kiun gvidis s-ino Franciska Toubale. Verŝajne vi konas ŝian voĉon en la Aŭstralia Radioelsendo. En la kurso, pli ol 20 personoj kune lernis. Ŝi montris parton de iu verkaĵo, kaj uzante ĝin ni lernis pri gramatikaĵo, ekzemple participoj, refleksivoj, k.t.p. En la unua tago ni legis la klarigon pri la pronomo “ci” de Zamenhof. Ĝi estas ne klara por mi. En la dua, “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj: Mondvojaĝanto Sekelj manĝis ion ajn, kiun la indiĝenoj manĝis, ĉar daŭrigi vojaĝon sen manĝo neestas eble. En la tria, “Kredu min sinjorino!” de Cezaro Rosetti: En la rakonto aperis multaj troigo, humuro kaj metaforo. Ni ĝuis ilin kaj ekzercis kiel uzi participon. En la kvara, “Kiel akvo de l’rivero” de Raymond Schwarz, aperis amuza epizodo: Julot kaj Dede en la vilaĝa preĝejo, dum geedziĝa ceremonio, faris petolaĵon. En la teksto aperas multaj sufiksoj *ig* kaj *iĝ*. Ni ekzercis fari frazojn uzante *ig* kaj *iĝ*. En la kvina, “Falantaj muroj” de Trevor Steele; li raportis kiam li vizitis la flughavenon Vnukovo, por iri al Kievo. Ni lernis pri uzado de akuzativo.

Posttagmeze okazis tri prelegoj, kaj vespere ĝis la sepa du aliaj programeroj.

Jen la titoloj, kiuj min amuzis: (en la 9a) Kuri majonezon – Helen Palmer; (en la 10a)

TEJO-Sinprezento – Alberto Garrido (Filipinoj); (en la 11a) La kosma programo Artemiso – Carlos Spinola; (en la 12a) Cikadoj: La sono de somero en mia ĝardeno – Terry Manley; (en la 13a) Montru kaj rakontu interesan objekton – kiuj ajn volontuloj prezentis raran muzikilon, kaj Ŝparporketoj: Kiel kaj kial mi kolektas ilin –Grazina Opulskiene (Litovio). Surprize ŝi kolektas pli ol 300 ŝparmonerujojn, tre ĉarmajn kaj amindajn el tuta mondo.

Epizodo: Sur ekrano mi hazarde trovis la vizaĝon de s-ino Jeniffer Bishop, kiu kun sia edzo vizitis min antaŭ 20 jaroj de Aŭstralio. Mia edzo gvidis ilin al la urbo Kamakura, ni fariĝis bonaj amikoj kaj ŝi sendis al mi tablotukon kaj memdesegnitajn pentraĵon. Poste mi neniam vidis ŝin. Mi ĝojis vidi ŝin danke al la *Zoom*-sistemo. Surprize ŝi translokiĝis al Anglujo antaŭ 4 jaroj. Do ŝi aliĝis de Anglujo (Kembriĝo). Se oni ne uzus *Zoom*-on, mi neniam vidus ŝin.



“Muzeo” – Reklamŝildo

En la aprila n-ro ni montris bildon kun reklamŝildo flanke de la fervoja linio – kion vidos praktike nur la trajnpasaĝeroj. En la fino de aprilo ni instalas reklamŝildon al la muro de la verando, kiun vizitantoj al la Muzeo facile trovos.



La 121-a Legokunsido

En la 5a de marto 2021 ni havis la 121-an legokunsidon por "Kiuĵ semas plorante ..." de Éva Tófalvi & Oldřich Kníchal. Partoprenis kvar personoj.

Kiuĵ semas plorante ... Bona rolo de la kontraŭheroo

Mizro Iwaya

Unue mi devas konfesi ke mi sentis malfacilon por legi tiun ĉi libron. Tion kaŭzis ĉefe la fakto ke la tempopaso en la libro ne estas en ordo. Nuntempan okazon sekvas antaŭtempa okazo, kaj fojfoje la historio subite saltas al meztempa rememoro. Ni devas sekvi la enhavon atenteme kun sufiĉa nervostreĉo.

Tiu ĉi estas historio ĵus antaŭ la dua mondomilito. Hitlero kaptis regpotencon kaj donis grandan influon al najbaraj landoj. Unu el ili estas ĉi-temata lando, supozeble Hungario. Faŝisma tendenco superkovris la tutan landon. El tio sekvis ke ankaŭ Esperanto-movado estis prispionata kaj subpremata. La ĉefrolulo estas juna lingva lektoro en iu universitato, kiu estis sendita al iu esperanta grupo por raporti la aktualan agadon de la grupanoj. Tia strukturo estas unika. Ni ofte legas esperantajn librojn pri nazia subpremo kontraŭ Esperanto-movado, sed ĉefe el la vidpunkto de esperantaj subprematoj. Ĉi tie la vidpunkto estas de la subpremantoj. La aŭtoro detale skribas kiamaniere la faŝisma partio aranĝis la aferon kaj plenumis la taskon. Stefano, la ĉefrolulo, fariĝis subagento de la partio pro sia distordita karaktero. Li helpis la partion, sed fine li mem ricevis severan rekompencan pro tio.

La aŭtoro estas hungarino. Mi memoras ke ŝi verkis elstaran eseon en "Pri homoj kaj verkoj". Ŝi montris tie sian profundan scikonon pri la Esperanto-movado post la dua mondomilito en Hungario. Do mi samtempe kredas ke ŝi havas profundan scikonon pri E-movado antaŭ la milito. La movado suferis severan subpremon ankaŭ en Japanio antaŭ la milito. Do ankaŭ mi havas komunan senton kun la aŭtoro. Ŝi atribuas la kaŭzon de komplikeco de Stefano al la malriĉeco en lia infaneco. Lia patro mortis pro la antaŭa milito. Ankaŭ lia patrino mortis post

li. Do la restinta infano suferis multan mizeron kompare kun riĉaj samklasanoj. Li estis saĝa kaj gajnis bonan noton en la lernejo. Tiam li komencis fari malican venĝon al sia riĉa amiko. Ekstere li estis bona knabo, sed interne li havis malican tendencon. Tiu fakto kondukis lin al konspira ago de faŝistoj.

Iu leganto diris ke ofte mankas "kontraŭheroo" en esperantaj verkoj. Tiusence Stefano ĉi tie estas bona ekzemplo de tia maliculo. Li estas bona spicaĵo en esperanta kuirajo.

Kiuĵ semas plorante ...

Aida Yayoi

En la unua paĝo de la libro troviĝas mallonga komento, ke ĉi tiu premiita verko estas psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto. Mi konsentas. Ankaŭ mi konsentas la sekvan diraĵon, t.e. "Kiel homoj povas erarvagi sub influo de politika ideologio." Pripensante tiujn du menciojn karakterizi la libron, mi volas havi pli klaran bildon pri temo kaj skribmaniero. Sed ambaŭ estis malfacilaj por akiri. En mia libro ne malmultaj dubo-signoj kolektiĝis.

Mi ne povis kompreni kial la juna protagonisto devas esti mortigita strangole; verŝajne pro lia perfido kontraŭ la faŝismo, sed pri la kaŭzo la aŭtoroj (ĉi tiu verko estis farita de du personoj, t.e. unu paro) ne klarigas detale. Stefano, la protagonisto, ankaŭ estis perfidulo kontraŭ Esperanta movado. Pro lia raporto al la ĉefo de sekreta polico, kelkaj esperantistoj estas arestitaj aŭ mortigitaj. Kial li devas fari tion? Kial li partoprenis la faŝistan agadon? Troviĝas nenia klarigo kvankam estas ŝlosilo en liaj vortoj. Certe ekzistas ĉi tie nur taglibra stilo, kiu ne baziĝas sur fikcia strukturo. Li pasigis malfeliĉan infanecon kaj junecon. Eble pro tio li fariĝis apatia preskaŭ pri ĉio eĉ pri sia alta posteno en la preĝeja komunumo.

Kiuĵ semas kun larmoj,

Tiuj rikoltas kun kanto.

Iutage en la esperanta kunsido Stefano Bende surprize ekvidis la citaĵon de la Malnova Testamento, ĉar neniam ĝis tiam ili tuŝis religiajn temojn. Sed pli detala klarigo aperas nek pri la situacioj, nek lia meditado mem. Tio estas nekomprenebla, ĉar la citaĵoj, precipe el

la unua linio fariĝis la titolo de la libro. Kaj plie la dua linio estas esenca esprimo por montri mizeran vivon sen rikoltado el la plenumo. La du linioj sentigas al legantoj malĝojan etoson. Miaopinie la rakonto ŝparas ellabori fikcian

teknikon. Ĝuste montras taglibran stilon, kiel menciita en la komenco de la libro.

Tre bedaŭrinde mi ne povis distingi la scenojn en la sanatorio de aliaj realaĵoj. Ĉu la aferoj en la sanatorio estas songoj?

eĥoj tutmondaj

el Ĉeĥa Gazeto

AEH transkopiis nin pri la muzeo

“AEH Informilo” estas monata gazeto de handikapuloj, eldonita de Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice. Ties numero por marto 2021 transkopiis nian artikolon “Esperanto-Muzeo Jokohama en preparo!”, en nia januara numero.

<https://onedrive.live.com/?id=AE2D0B68AAC582F%2110107&cid=0AE2D0B68AAC582F>

el Ĉeĥio

Mi ĵus vizitis vian retpaĝon. Interesa iniciato pri via ekspozicio. Ĉu la ekspozicio estas planata ĉi-jare en aŭgusto? Hodiaŭ, dum la reta kunveno ĉe Herzberg am Harz Esperanto-urbo (Germanio) mi eksciis, ke la 25-an de aprilo 2021 oni malfermas en Jokohamo Esperantan muzeon aŭ bibliotekon. Ĉu eblas trovi plian informon en la reto pri tiu evento? Antaŭdankon pro via respondo.

Kun amikaj salutoj el Pollando
Jerzy / Georgo 13 aprilo 2021

— Al li ni respondis, ke ekspozicio ne estos speciale en aŭgusto, sed ni ekspozicias jam lernolibrojn ktp por la malfermo en la fino de aprilo.

el Germanio

Karaj,

Ni ricevis vian gazeton „Novaĵoj Tamtamas”. Ni gratulas vin, ĉiujn Tamtamanojn ke vi sukcesis atingi vian revon. Dum Zoom renkontiĝo de Esperanto-urbo Herzberg, oni menciis pri via nova biblioteko.

Ni ege bedaŭras ke ni ne povas partopreni la feston de malfermo de via kluba domo. Ĉion bonan. Atentu vian sanon.

Yoshie kaj Dieter Kleemann
Von meinem iPad gesendet

el Kroatio

Korajn gratulojn al Jokohamo okaze de la malfermo de Esperanto-Muzeo. Kiu estas la posedanto de la konstruaĵo?

Kore, Spomenka Štimec kaj Kroata Esperanto-Ligo

— Al ŝi ni respondis, “La Muzeo (konstruaĵo entute) estas propra posedaĵo de ni, nome Neprofitocela Organizo Jokohama. Tiu estas jura persono fondita antaŭ 6 jaroj, kiel sekvanto de neĵura organizo Jokohama Esperanto-Rondo, kies fondoĵaro estis 1968.

el Italio

Gratulegojn, Sibayama kaj jokohamaj esperantistoj! ni certe bezonas pli kaj pli da fizikaj esto-punktoj ankaŭ en ĉi tiu epoko de kvazaŭa vivo en la reto!

Amike, Renato Corsetti

el Slovakio

Kia estas la situacio kun pandemio? En Slovakio la situacio estas pli bona. Malrapide la vivo komencas esti normala. Mi ricevis 2 vakcinojn (*Pfizer*). Mi estis nur iomete laca post la unua kaj dua vakcino kaj mi havis doloron al brako post la dua. Miaj geamikoj preskaŭ nenion.

Mi havas ĉiam gelernantojn, mi laboras en ĝardeno. La vetero estas ankaŭ ofte malvarma. Japanaj ĉerizoj sakuro floras proksime.

Mia kato Tigrik havas preskaŭ 10 jarojn. Ĝi fartas bone.

Salutojn el Kosice!
Salutas vin Jana Rambousková